

Heinrich Heine,  
Libro de l' kantoj, antaŭparolo je la tria eldono

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Jen estas la fabel-arbar'!  
Mi flaras tilio-floron!  
Kaj la miriga luno-bril'  
Sorĉigas mian koron.

Promenis mi, dum la irad'  
Eksonis en la foro  
De l' najtingalo rava kant'  
Pri am' kaj am-doloro.

De am', am-veo kantis ĝi,  
De larmoj kaj ridado;  
Jubilis ĝi triste, singultas pro ĝoj',  
vekiĝis malnova sonĝado.

Pluiris mi, dum la irad'  
Mi vidis en la fono  
Kastelon sur tre larĝa plac',  
Altegis la frontono.

Fermitaj fenestroj, ĉie ĉi  
Silento kaj malĝojego;  
Kaj estis, kvazaŭ loĝis la mort'  
Malantaŭ jena murego.

...

Kaj antaŭ la pordo, jen kuŝis sfinks',  
 Skulptaj' de volupt' kaj teruro;  
 Leonan korpon havis la  
 in-kapa, kun-mama figuro.

La blanka vido de la in'  
 Parolis de voluptemo;  
 La mutaj lipoj volbis sin,  
 Ridetis de sindonemo.<sup>2</sup>

Ĉe l' najtingala rava kant'  
 Ne povis mi kontraŭstari;  
 Kisinte ŝian vizaĝon mi  
 Ne povi plu ion fari.

Ekvivis la marmora bild',  
 La ŝtono ekĝemegis -  
 La ardon de miaj kisoj ŝi  
 Avide eltrinkegis.

Sufoke ŝi kiségis min,  
 Volupton postulante;  
 Kaj fine min ĉirkaŭprenis ŝi,  
 Per-unge min disŝirante.

Tortur' feliĉega! La dolĉa dolor'  
 Plenigis min senmezure;  
 Kaj dum la buŝo ravigis min,  
 La ungoj min lezis terure.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ridetis pri memdonemo.

Kantadis la najtingal': „Ho am',  
 Respondu demandon mian:  
 Pro kio vi miksas kun mort-turment'  
 Feliĉon ĉiun vian?

Ho bela sfinks', ho solvu la  
 Enigmon malfacilan!  
 Pripensis mi pri tio ĉi  
 Jam tempon kelkjarmilan.“

*Traduko de la Germana poemo “Buch der Lieder, Vorrede zur dritten Auflage” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-03-31.*

MR-121-1 / Arg-216-425 (2004-03-15 16:10:41)

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, en la antaŭparolo al la tria eldono. La plua teksto de tiu ĉi antaŭparolo estas:*

*'Mi estua povinta diri ĉion tion ĉi en bona prozo...Sed kiam oni tralegas la malnovajn poemojn, por priŝlifi ilin iom por nova eldono, tiam oni estas neatendite ree kaptata per la belsona kutimo de rimado kaj versritmo, kaj jen! Estas versoj, per kiuj mi malfermas la „Libron de l' kantoj“. Ho, Febo Apolono! Se tiuj versoj estas malbonaj, vi certe pardonos al mi... Ĉar vi estas ĉioscia dio, kaj vi scias tre bone, pro kio mi ekde multaj jaroj ne plu povis prefere okupiĝi pri versmezuro kaj samsoneco de vortoj... Vi scias, pro kio la flamo, kiu kiel brilega piroteknikaĵo delectis la mondon, subite devis esti uzata por multe pli seriozaj incendioj... Vi scias, kial ĝi nun en silenta ardo konsumas mian koron.... Vi komprenas min, granda, bela dio, kiu ankaŭ vi interŝanĝis foje la oran liron per la forta arko kaj la mortigaj sagoj... Ĉu vi memoras ankoraŭ pri tiu Marsio, kiun vi vive senhaŭtigis? Estas pasinta tio jam delonge, sed simila ekzemplo nun ree estus necesa.... Vi ridetas, ho mia eterna patro!'*

*Skribite en Parizo je la 20a de Februaro de 1839*

*Heinrich Heine*